Christian Morgenstern,

# La lupfantomo

*tradukita de Bertilo Wennergren*

Jen lupfantom' de famili'
meznokte iam kuris for
al tombo de la profesor'.
kaj petis pri konjugaci'.

Do diktis tiu dokta ul'
starante sur la kructabul'
dum lup' senmova kiel splinto
atentis vortojn de l' mortinto.

De "lupfantomo", simpla rekta,
tra "lupfintomo", plej perfekta,
plu "lupfontomo", iom rara,
ĝis "lupfuntomo", ho, koŝmara.

Ĉi participoj plaĉis multe
al la fantomo, kaj rezulte
ĝi petis: "Legu plu el PIV-o
pri participoj en pasivo."

La viro ĉagreniĝis tamen:
"Jam fermis mi per fin' kaj amen,
ĉar netransiraj bestoj feblas
kaj la pasiv' neniam eblas."

Sed lupfantomo pri transiro
ja spertas pli ol eĉ vampiro.
La lup' revenis larmokula
al sia famili' ulula.

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf" de* CHRISTIAN MORGENSTERN *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de Bertilo Wennergren.*

*Arg-825-1653 (2013-02-14 23:29:47)*

*Vidu la retejon* `http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html`.

Christian Morgenstern,

# Le loup-garou

*tradukita de R. Platteau*

Un loup-garou, une certaine nuit,
Laissa sa moitié et puis se rendit
Auprès de la tombe d'un maître d'école
Et lui dit, " sur moi dis tout, c'est ton rôle ! "

Un loup-garou, une certaine nuit,
Laissa sa moitié et puis se rendit
Auprès de la tombe d'un maître d'école
Et lui dit, " sur moi dis tout, c'est ton rôle ! "

" - On peut à ton sujet puisque nous y sommes
Se demander encor bien des choses en somme.
Loup-garoù ? mais avant
Il faut se dire : loup-garquand ?

Loup-garcomment ? et puis
Bien évidemment loup-garqui ? "
Toutes ces questions semblèrent au loup bien absconses,
Car en fait ce qu'il voulait c'était les réponses.

" - Point de réponses, dit le puits de savoir,
Etre imaginaire, nul ne peut te voir ! "
A ces mots l'animal éclata tout en larmes.
" - Oh!, même les baisers de ma douce moitié

Ne pourrons plus me faire me sentir tout entier.
Rester un loup-garou est un sort qui m'alarme. "
Mais comme le loup était bien poli
Il remercia et puis repartit.

*Traduko de la Germana poemo "Der Werwolf" de* CHRISTIAN MORGENSTERN *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en la Francan de R. Platteau.*

*Arg-825-1655 (2013-02-13 21:56:38)*

*Tiu ĉi francigo troviĝas en* `http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html`.